

Historia skizo pri Brno

En la jubilea jaro 1957 por eksterlandaj amikoj eldonis:
Eperanto-rondeto ĉe uzina klubo ROH-1.B.ZKGn.p.Brno Redaktis: Ernesto Balaš

BRNO la urba centro





HISTORIA SKIZO PRI BRNO.

Brno estas unu el 19 regionaj urboj en Ĉeĥoslovakio kaj post la metrotropolo Praha la dua plej granda urbo en la ŝtato. Ĝi situas norde de la kunfluejo de rivero Svratka kaj Svitava, 206 m super la maro. La urbon ankoraŭ trafluas rivereto Ponávka, sed plejparte per subteraj kanaloj. Brno situas en larĝa valo, ŝirmata el tri flankoj per montetoj kaj arbaroj, nur sude malfermita por varmaj ventoj. En ĉi tin loko vivis verŝajne jam longe antaŭ Kristo Keltoj, kiuj poste devis cedi la teritorion al germanoj kaj tiuj al slavoj. Keltoj postlasis ne kutiman nomon en ĉi tiu loko, kiun slavoj tradukis kaj kreiĝis la nomo Brno.

Cent jarojn post la disfalo de la Grandmoravia regnolando, en la jaro 1018 la princo Oldřich definitive kunligis Moravion kun la ĉeĥa regnolando kaj reganto de Moravio fariĝis lia filo Břetislav. Li konstruigis sur la monteto de nuntempa preĝejo Petrov kastelon kaj donis al ĝi nomon Brno. En la ĉirkaŭaĵo estis kelkaj slavaj vilaĝoj. Verŝajne unu vilaĝo situis inter nunaj stratoj Josefská, Orlí kaj Třída vítězství kaj ĝia nomo estis Měnín. Ĉi tiu vilaĝo rapide kreskis sub la influo de la kastelo kaj la kastela preĝejo s. Mikaelo fariĝis paroĥo de la vilaĝo. Poste oni konstruis novan kastelan preĝejon s. Petro en la centro de la kastelo.

La unua ĝis nun konata noto pri historia Brno estas en la kroniko de Kosmas ĉirkaŭ la jaro 1091. Komence de la 13a jarcento en alia vilaĝo vivis germanoj, kiuj havis preĝejon s. Jakobo kaj romanoj vivis ĉirkaŭ la preĝejo s. Nikolao, kiu situis ĝis 1870 sur Liber.pl.

La reĝo Venceslaŭo I kunigig tiujn vilaĝojn kaj tiamaniere estis jam en la jaro l243 urbo Brno kun urbaj rajtoj. Brno estis ĉirkaŭita de remparoj kaj muroj, kiuj konserviĝis ĝis la 19a jarcento. Al la urbo apartenis ankaŭ la juda vilaĝo ĉe la nuna ĉefa stacidomo. Jam en la jaro 1209 fondis en la nuna antaŭurbo Zábrdovice sinjoro Leono el Zábrdovice monaĥejon kun preĝejo de s. Mario, kiu estis konsekrita okaze de la vizito de la reĝo en Brno. La urbanoj

estis tre riĉaj, kiel evidentiĝas el tio, ke 1a urbano Rudgerus aĉetis lokon kaj fondis malsanulejon por mizeruloj kaj eksterladanoj. En la jaro 1240 la urbano Schwarz fondis virinan monaĥejon de s. Aŭgustino kaj en tiu tempo oni menciis ankaŭ lernejon en Brno.

La nova kastelo, sub germana influo nomita Špilberk, estis finkonstruita en la jaro 1277 de Přemysl la IIa sur proksima monteto apud Petrov. Antaŭ la urbo, ĉefe ĉe riveraj vadejoj, keiĝis novaj vilaĝoj.

Sub la influo de eksterlandanoj ricevis Brno germanan aspekton. Dum la regado de Karlo la IVa en Bohemio estis ankaŭ en Moravio bonstato, ĉar tir regis lia frato Johan Henriko kaj al Brno transloĝiĝis multaj slavoj. Tra la urbo estis kondukitaj gravaj vojoj al Bohemio, Hungario, Aŭstrio kaj Polio. Multaj urbanoj ricevis influajn poziciojn en la societa vivo kaj kreskas la klasa konflikto. Oni notas ribelojn de la urbaj mizeruloj kaj estas postulata religia reformo. La unua fazo de reformoj kulminis en Bohemio per la agado de majstro Johano Hus. Husanoj multe gajnis, sed husitaj soldatoj estis de urbaj fortikaĵoj forpelitij. Per tiu milito multaj urbanoj perdis ĉion ekster la urbaj muroj kaj ĉefe suferis la posedaĵo de la katolika religio. En la jaro 1416 oni konstruis akvokondukilon el la rivero Svratka trans la kruta monteto Františkov al la Supra kaj Malsupra placoj, kie estis akvujoj. En Brno estis kontraktita repacigo kun Husanoj. Laŭ la impostlisto vivis tiam en Brno 762 familioj en 448 domoj kaj en 4 urbopartoj. Judoj kaj antaŭurboj ne estas enkalkulitaj. En Brno estis proksimume 8.000 homoj.

Post la morto de Matiaso en la jaro 1490 estis elektita kiel landa estro Ctibor Tovačovský z Cimburka, kiu anstataŭigis ĉe la juĝo la latinan lingvon per la ĉeĥa lingvo kaj tiamaniere estis la ĉeĥa lingvo ofica lingvo en la tuta Moravio kaj ĝi restis tia ĝis la j.1628.

Dum la regado de aŭstria Ferdinando oni vendis la kastelon Špilberk al la urbo Brno la l4. de oktobro 1560 per ĉeĥa dokumento. La granda aŭstria regno daŭris 392 jarojn. Brno fariĝis unuranga fortikaĵo de la tuta regno, nome per la batalo kontraŭ svedoj, kiuj kelkfoje atakis vane la urbon. Svedoj ĉirkaŭigis Brnon kaj pafadis el kelkaj baterioj de la 3a de majo ĝis 23an de aŭgusto. Nur 1476 viroj en Brno staris kontraŭ 28.000 viroj de la "nevenkebla" svedo Torstenson. Eĉ novaj l0.000 viroj el Hungario ne povis helpi al svedoj kaj tial svedoj forlasis Moravion. Ĉiuj Brnanoj manifestis verajn miraklojn de kuraĝeco kaj en la jaro 1645 estis Brno konata kiel fama urbo en la tuta Eŭropo. En la 30jara milito signifis tiu batalo gravan ŝanĝon por Aŭstrio kaj la imperiestro ordonis rekompenci urbon. Sed la urba aspekto estis terura. La tombejo ĉe s. Petro malaperis kaj la preĝejo mem estis nove konstruita. Nove estis konstruita la preĝejo kaj monaĥejo por Kapucenoj. Leopoldo la Ia nove fortikigis Brnon. Antaŭ la muro estis 8 grandaj bastionoj, ĉirkaŭ la muroj kaj bastionoj estis fosaĵo kun alta antaŭmuro.

Dum la regado de Josefo la Ia estis en Brno 42 metiistaj korporacioj.

Lastan grandan rolon ludis Brno okaze de la batalo kontraŭ la prusa reĝo Frideriko la IIa, kiu venkis ĉe Olomouc en la jaro 1741. Sed Brno ne estis konkerita kaj la reĝino Maria Teresia dankis al ĉiuj Brnanoj. Depost la l.VI.1749 estis regula poŝta komuniko kun Vieno, Praha, Olomoc, Jihlava kaj Znojmo. l751 estis fondita kreditejo kaj poste pruntejo. 1754 la registaro fondis fabrikojn por delikataj drapoj, por feloj kaj por prilaboro de tabako. La loĝantaro kreskis a1 22.814 kaj Brno fariĝis la unua industria urbo en la aŭstria imperio. Fabrikojn konstruis en antaŭurboj ĉefe fremdlandanoj el Rejnolando kaj Saksujo. Ĉar ankoraŭ mankis maŝinoj, estis serĉataj laboristoj kaj tiel estiĝis novaj antaŭurboj. l785 fondis la imperiestro en Brno la imperiestran kaj reĝan polican direktorejon. La popolo en l0 antaŭ-urboj estis tute liberigita kaj ricevis la saman rajton kiel la urbanoj. La reĝo Josefo la IIa submetis la katolikan religion al ŝtato kaj nuligis kelkajn monaĥejojn. En Zábrdovice estis la monaĥejo ŝanĝita al la garnizona kuracejo. Estis malpermesite enterigi en preĝejoj kaj estis fondita nova granda tombejo. En la urbo restis 5 paroĥejoj kaj en antaŭurboj du. Ĉe la urbaj paroĥejoj estis germanaj lernejoj.

En tiu estis Napoleono en Vieno kaj marŝis al Moravio. Sed la imperiestraj soldatoj forlasis Brnon kaj tial francoj ricevis ĉiujn imperiestrajn provizaĵojn. Napoleono loĝis en la Landa domo kaj pli ol 20.000 soldatoj loĝis en urbaj domoj. Komenciĝis terura batalo inter tri imperiestroj 20 km apud Brno sur la monteto, kie nun staras por la memoro la Monumento de paco. Brno akceptis senĉese vunditajn batalantojn kaj militkaptitojn. La napoleona milito plifortigis en Eŭropo la nacian konscion de multaj malgrandaj nacioj.

La landa prefekto en Brno estis grafo Mitrovski, kiu estis la animo de ĉiuj klopodoj sciencistaj ne nur en Brno, sed en la tuta Moravio. 1831 fondis junaj teologoj unuan ĉeĥan bibliotekon. La kastelaj muroj estis de francoj ruinigitaj, Brno ĉesis esti fortikaĵo kaj la kastelo ricevis novan taskon, ĝi servis plue nur kiel malliberejo. La fosaĵoj estis ŝutplenigitaj kaj ankaŭ la dua urba muro estis disfaligita.

La 19an de aŭgusto 1836 estis aranĝita Moravia-Silezia industria ekspozicio en nuna teatrejo Reduta, kie la imperiestro aĉetis por la viena teknika kabinedo diversajn objektojn en la valoro de 500 guldenoj.

Brno prosperis ĝis la jaro 1848 kaj kalkulis jam pli ol 45. 000 da loĝantaro. La nacian konscion vekis Klácel, Sušil, Šembera kaj estis jam multaj kleruloj, kiuj parolis ĉeĥe. Ili strebis la egalecon inter la germana kaj ĉeĥa lingvoj. La imperiestro nuligis libran censuron, liberigis politikajn arastitojn el Špilberk kaj permesis fondi nacian gvardion. Estis eldonita ĉeĥa gazeto "Moravské noviny" kaj fondita ĉeĥa societo "Moravia societo de Cirilo kaj Metodo", kiu preparis ĉion necesan por la viena parlamenta elekto. En la jaro 1900 vivis en Brno jam 109.361 homoj, el kiuj 62% aliĝis al la germana lingvo kaj 35% al la ĉeĥa lingvo, ĉar urbaj oficejoj preferis la germanan lingvon. Urbaj stratoj estis lumigitaj per gaso. Estis fondita industria mezlernejo kaj la unua Esperantoklubo en la tuta aŭstria-Hungaria regno. Stratoj estis poste lumigitaj per elektraj lampoj kaj estis jam videblaj tramoj. Granda okazintaĵo estis la konstruo de la nova 60 km longa akvokonduko el Březová. Estis ankaŭ organizita laborperejo por senlaboruloj.

Aŭstrio proklamis al Serbio militon. Germanoj en Brno ĝojis, sed ĉeĥoj simpatiis kun malgranda Serbio. Brno fariĝis centro por diversspecaj transportoj, kreskis malsanulejoj kaj multaj rifuĝintoj alvenis. Sub la influo de la Granda Oktobra Rusa revolucio laboristoj en Brno aranĝadis strikojn kaj pacajn popolkunvenojn. Fondiĝis nova Ĉeĥoslovaka respubliko kaj en Brno ĉesis funkcii la germana urba administrado.

En la jaro 1919 ekfunkciis la universitato kaj konservatorio. Al la urbo estis aligitaj pluaj 22 antaŭurboj. 61% da loĝantaro estis ĉeĥoj, 34% germanoj kaj 4, 5% judoj. La domkonstruado estis tre vigla. Oni konstruis katolikajn preĝejojn s. Aŭgusto sur Babákplaco, s. Cirilo kaj Metodo en Židenice kaj salezianan preĝejon en Žabovřesky. La nova ĉeĥoslovaka eklezio konstruis preĝejon je nomo de Hus. Por administrado estis konstruitaj grandaj domoj sur Veveří kaj Leninova stratoj. En la jaro 1921 havis Brno 13.380 domojn kaj jam en la jaro 1938 pli ol 23.765. Sed denove ekflamis milito.

Slavakio fariĝis memstara respubliko kaj Bohemio kun Moravio fariĝis germana protektorato. En Brno estis denove sur unua loko la germana lingvo, en Špilberk estis enkarcerigitaj ĉeĥaj kaj slavaj patriotoj kaj tie estis ankaŭ konstruitaj subteraj ejoj por amasa mortigado de politikaj kontraŭuloj. Feliĉe antaŭ la finkonstruo de tiu terura instalo finiĝis la dua mondmilito.

Post la jaro 1945 estis en Brno rekonstruitaj pli ol 17.350 domoj kaj konstruitaj novaj 4.500 komfortaj loĝejoj.

Fondita estis ankaŭ zologia ĝardeno en Bystrc, proksime al la lago de valbaraĵo.

Estis ankaŭ novkonstruitaj halegoj en la ekspozicia tereno en Pisárky (kie estis en la jaro 1928 granda kultura ekspozicio), en kiuj oni planas por la jaro 1958 unuan internacian foiron.

Plibonigita estas ankaŭ la fama brna aŭtomobila kaj nun motorcikla rondŝoseo por internaciaj konkurs-veturoj.

Sed sufiĉe por la nuna tempo!

En malnova historia tempo estis konstruitaj plejparte lignaj domoj. Ŝtonon oni uzadis nur por ekleziaj konstruaĵoj. Tial konserviĝis senescepte nur ekleziaj konstruaĵoj.

La plej malnovajn fragmentojn de la preĝejo oni trovis en la loko de nuna katedralo. Sur tiu loko iam staris la malnova kastelo kaj ĉirkaŭ la jaro 1080 romana baziliko, rekonstruita ĉirkaŭ la jaro 1250 en gotikan stilon. Nove estis la preĝejo renovigita en la 14a jarcento kaj el ĉi tiu tempo konserviĝis la absido ĝis hodiaŭa tempo.

Ĉiuj aliaj partoj de la preĝejo estis dum tridekjara milito de svedoj ruinigitaj. Novkonstruita estis la preĝejo en la 18a jarcento en baroka stilo, sed en la 19a jarcento ĝi estis rekonstruita en gotikan stilon. La du novgotikaj turoj devenas jam el unuaj jaroj de la 20a jarcento.

En proksimeco sur la alia monteto situas la nova kastelo el la 13a jarcento, la iama sidejo de moraviaj markgrafoj. El gotika stilo ĝi estis rekonstruita en renesancan stilon kaj post la jaro 1645 estis la kastelo ŝanĝita en citadelon, kies kazematoj servis kiel malliberejo.

La dua paroĥeja preĝejo estis s. Jakobo, la centro de germanaj koloniistoj. La preĝejo estis kelkfoje pligrandigita kaj rekonstruita ĝis hodiaŭa formo, kiun ĝi ricevis en la 16a jarcento. La preĝejon ankaŭ renovigis la fama malfrue-gotika skulptisto Pilgram. Konserviĝis baroka orgeno kaj el la 15a jarcento ligna krucifikso. Bronzan statuon de la brnoa defendanto dum la sveda milito el la jaro 1727 Raduit de Souches fabrikis la brnoa metalfandisto J. Z. Kerker. El ĉiuj urbaj pordegoj konserviĝis nur la pordego "Měnínská" ĝis hodiaŭa tempo, sed, jam en ŝanĝita aspekto.

En la 14a jarcento reĝino Eliška Rejčka igis konstrui en Malnova antaŭurbo Brno monaĥejon kun preĝejo de Ĉieliro de Maria la Virgino. La preĝejo estis jam konstruita el brikoj en gotika stilo kaj konserviĝis preskaŭ en la originala aspekto. La interna dekoracio estas en baroka stilo. La altara bildo estas de Josefo Rotter. La monaĥejo estis poste renovigita en baroka stilo.

Al la plej belaj barokaj preĝejoj en Brno apartenas la preĝejo de s. Maria en Zábrdovice, kiu estis konsekrita okaze de la vizito de la reĝo Přemysl en Brno en la jaro 1211. Ĝin fondis kune kun la apuda monaĥejo posedanto Leono el Klobouky. Al la preĝejo estis alkonstruita kapelo de Maria el Čenstochová kaj la bildo de Mario estas vera kopio de la originalo en Pollando, kie estis la bildo ankaŭ sanktigita. Sur la fera pordo de la kapelo estas legebla la jaro 1755.

Alia baroka preĝejo estas la jesuita preĝejo, kiu estis konstruita sur la bazfragmentoj de iama gotika preĝejo ĉe la virina monaĥejo. La monaĥejo estis en la 16a jarcento ŝanĝita al jesuitana lernejo. Riĉaj Jesuitoj ornamigis la preĝejon interne en la 18a jarcento. Kiel preĝejarkitektoj en Brno estis famaj patro kaj filo Erna. La filo renovigis en la 17a jarcento kadukan dominikanan preĝejon de s. Mikaelo en barokon. La statuoj de la ŝtuparo estas el la l8a jarcento. Ĉi tiu preĝejo estis iam gotika stilo kaj ĉe ĝi staris granda dominikana monaĥejo, el kiu kornserviĝis nur la klaŭstro. La monaĥejo estis pligrandigita kaj renovigita en baroka stilo de Grimm, kiu tiucele adaptis la landan juĝejon kaj princan salonon. Poste ricevis tiu konstruaĵo la nomon "Nova urbdomo" kaj hodiaŭ estas tie urbaj oficejoj.

Alia de svedoj siatempe ruinigita preĝejo estis la preĝejo de s. Tomaso, kiu estis kune kun la monaĥejo de Aŭgustianoj fondita en la 14a jarcento tuŝapude ĉe urbaj muroj. El gotika stilo estis la preĝejo aligita al baroka stilo. Ĝia interno montras eĉ iomete rokokajn elementojn. Valora skulptista laboro el la 14a jarcento estas la Dolora Di-patrino. Grimm konstruis el la monaĥejo gubernian palacon kaj hodiaŭ estas en ĝi lokigitaj urbaj oficejoj. Grimm ankaŭ renovigis preĝejon de s. Johanoj (la Baptisto kaj la Evangelisto) por Minoritanoj. La turo staris sola, sed inter la turo kaj preĝejo estis konstruita preĝejo kun

loretana kapelo de s. Maria kaj kun t. n. sankta ŝtuparo, sub kiu troviĝas sanktaj restaĵoj. En la loreto estas reliefo el la 16a jarcento. La plafonaj pentraĵoj estas de fama baroka pentristo Joh. Etgens. Grimm konstruis ankaŭ preĝejon de s. Leopoldo ĉe la monaĥejo de Bonfaraj fratoj sur nuna Koněvova strato. En la monaĥejo estis malsanulejo, kiu ekzistas ĝis hodiaŭ.

Sur Kapucena placo sub Petrov staras kapucena preĝejo, fama per la kripto, en kiu estas per seka argilo mumigitaj kadavroj de kapucenoj kaj bonfarantoj de ilia ordeno. La konstruaĵo estas en tipa stilo de franca ordena baroko.

En la iama monaĥejo de Ursulaninoj sur la strato Josefská estas hodiaŭ instalita teknika muzeo, nur la apuda preĝejo de s. Josefo funkcias kaj la malnova bela kapeleto en la korto.

En la strato Františkánská estas preĝejo de s. Maria Magdalena kun bone imitita pentraĵo de Rubens.

Publikajn konstruaĵojn reprezentas precipe malnova urbo kun la plej malnova gotika parto. La turo estas ornamita per belega portalo el la 16a jarcento. En la koridoro oni pendigis la radon, por kiu Georgo Birk en la jaro 1636 vete lignon en arbaro hakis, prilaboris kaj ankoraŭ en la sama tago rultransportis el Lednice (50 km) al Brno.

Apud la rado estas remburita krokodilo, la fama donaco al urbdomo. La sola urba fontano estas sur la Placo de 25. februaro. Ĝin konstruis Fischer el Erlach kaj ĝi simbolas 4 mondpartojn, interne la praepokan inferon. Ĝi estas konata sub la nomo Parnas.

Dua akvujo, kiu estis iam sur nuna Placo de libereco, staras nun en la korto de landa muzeo. En baroka stilo ĝin konstruis Ignác Bendl. Ĝiaj plastikaĵoj bildigas diojn Merkur, Neptun, Vulkan kaj diinon Ceres. La malnova parto de la muzeo konsistas el la iama episkopa bieno, la nova parto troviĝas en la iama palaco de Ditrichstein el la jaro 1630.

En malsupra parto de la nomita placo situas teatro Reduta, kie estis prezentita unua ĉeĥa teatraĵo en la jaro 1822. El la komenco de la 15a jarcento konserviĝis ĉe la ponto trans la rivero Svitava sur Křenová strato kolono de Zderad. Ĝi signis tiam la urban limon.

En la strato Dominikánská estas bela domo de Poděbrada suvereno kun renesanca korto. Ĉi tiu domo apartenas nun al la urba muzeo. Alia el malmultaj nobelaraj palacoj en Brno staras sur la placo de Libereco no. l7. Ĝi havas tre belan fasadon kaj apartenis al nobelaro el Lipá.

Komence de la 19a jarcento oni konstruis fabrikojn kaj ludomojn. Restaĵoj de urbaj fortikaĵoj estis nuligitaj kaj sur tiuj lokoj aperas parkzono.

Je la fino de la jarcento oni konstruis evangelian preĝejon sur Třída obránců míru kaj apude la novan Landan domon, teatron de Janáček, fakultan malanulejon sur Pekařská kaj ĉefan stacidomon, kiu depost la jaro 1839 fariĝis grava nodo de fervoja trafiko.

Ne kritiku severe nian urbon nur laŭ la unua malagrabla impreso sub la influo de malserena urba panoramo. Travagadu ĝiajn stratojn kaj rigardu ĝiajn vidindaĵojn, kiuj tamen estas multaj, rekonu ĝian historion kaj ĝuu ĝian samtempecon! Ĉio donos al vi instruon kaj ĝojon!

Urbo Brno estis jam en la pasinta jarcento fama pro sia teksindustrio. La invento de vapormaŝino fare de Watt en Anglujo komence de la 19a jarcento estis stimulo al enkonduko de mekanigo en la teksa industrio, kaj tiel estis komencita la glora tradicio de fabrikado de energetikaj instalaĵoj en la Unua Brna Maŝinfabriko.

La lulilo de la Unua Brna Maŝinfabriko estis la teksfabriko de Lutz en Šlapanice apud Brno, kie estis konstruita en la jaro 1821 la unua vapormaŝino kun labordono de 10 ĉevalpovoj. Granda mendemo pri vapormaŝinoj elvokis rapidan plivastigon de la entrepreno. En tiu tempo oni jam konstruas la unuan fervojon kaj en la jaro 1836 ankaŭ relvojon el Břeclav al Brno. Lutz translokas tial sian entreprenon el Šlapanice el Brno en straton O1omoucká - en la centron de Moravia industrio, kaj samtempe li aĉetas kelkajn

maŝinkonstruajn entreprenojn en Brno, koncentras ilian produktadon sub nomon Unua Brna Maŝinfabriko kaj liveras vapormaŝinojn en Bohemion, Hungarion kaj Rusujon.

En la jaro 1872 Lutz deaĉetas la entreprenon de Bracegilder kaj plilarĝigas la produktprogramon de la nova societo por vapormaŝinoj sistemo Corlis, kaldronoj, akvoradoj kaj turbinoj, pumpiloj, teksmaŝinoj, transmisiiloj kaj diversaj instalaĵoj por la fervojoj. En la jaro 1888 li liveras rapidmovajn vapormaŝinojn, ekipitajn per la unua aksa regulilo, por la elektrejoj en Romo kaj Montevideo. Per gajno de licenco por konstruado de plurmembraj kaldronoj de sistemo Babkoch Wilcox en la jaro 1889 akiris la Unua Brna Maŝinfabriko dominantan pozicion en konstruado de vapormaŝinoj kaj kaldronoj. En la jaro 1900 okazis fuzio kun la entrepreno de Vannieck, fondita en la jaro 1865, kaj per tio estis vastigita la produktprogramo per fabrikado de maŝinoj por brikfarejoj kaj por ceramika industrio.

Grava limŝtono en la historio de la Unua Brna Maŝinfabriko estas la jaro 1901, kiam ĝi gajnis de la Londona firmo "Parsons Patent Co. Ltd." ekskluzivan rajton por turbin-fabrikado en Meza Eŭropo. En la jaro 1903 estis jam fabrikita kaj funkciigita la unua vaporturbino kun labordono dm 100 KV.

En komenco de la 20a jarcento fuziis la Unua Brna Maŝinfabriko kun la Pauker-uzino en Vieno kaj la uzino de Rock en Budapeŝto. Tuŝe antaŭ la dua mondmilito ĝi nuligis tiujn ĉi 2 interes-kompaniojn kaj fuziis kun la dua úlej granda uzino en Brno, la Maŝinfabriko de Královo Pole. En tiu periodo ĝi jam ne limigas sin al fabrikado de turbinoj laŭ fremda licenco, sed per propraj elementoj rapide evoluiĝas konstrukciojn de turbinoj, kiuj atingis mondfamon.

En la jaro 1950 apartigas la Unua Brna Maŝinfabriko disde la Maŝinfabriko de Královo Pole, kaj unu jaron pli poste ĝi specifas sian programob ekskluzive je fabrikado de plej diversaj tipoj de turbinoj kaj kaldronoj. Dum la tuta periodo de sia produktado fabrikis la Unua Brna Maŝinfabriko pli ol 3.000 turbinojn kaj 10.000 kaldron-unuojn ĝi liveris al elektrejoj, al termocentraloj, celulozfabrikoj, paperfabrikoj, sukerfabrikoj, kemiaj uzinoj, uzinoj de nutraĵa kaj teksa industrioj, al minejoj, metalfandejoj en Ĉeĥoslovakio, Sovetio, Pollando, Rumanio, Hungario, Jugoslavio, Aŭstrio, Germanujo, Irlando, Italio, Turkujo, Sirio, Hindujo, Kanado kaj Suda Ameriko.

La Unua Brna Maŝinfabriko estas samtempe unu el la plej grandaj produktantoj de tubegaroj en Ĉ.S.R.

Hodiaŭ fabrikas la Unua Brna Maŝinfabriko laŭ propraj konstrukcioj:
membrajn akvotubajn kaldronojn ĝis labordono 60t/h kaj premo ĝis 70 atp,
varmradiajn kaldronojn kun krada hejtado en amplekso de labordono 20 t/h - 75 t/h,
granuigaj kaldronoj kun interfakado aŭ centra muelejo,
granuligaj kaldronoj por rekta blovado kun unuodenaj mueliloj,
granuligaj kaldronoj muelejaj,
kaldronoj kun elfanda fajruro por nigra cindrolasa hejtmaterialo, kaldronoj kun ciklona fajruro,
kaldronoj oleaj kaj gasaj,
kaldronoj por bruligo de sulfataj lasivaĵoj,
fajrokradoj bendaj, antaŭŝovaj aŭ trarastaj,
pulvora hejtado kun bruliloj angulaj, alklinaj kaj giraj,
kombinitaj fajrokradaj kaj pulvoraj hejtiloj,
mulejoj,
pistiloj de skorio,
senpolvaj senŝlakigiloj,
Kondensaj turbinoj sen regulata vapor-ĉerpado kun labordono ĝis 50MN,
kondenzaj turbinoj kun unu kaj kun du regulataj vapor-prenadoj 25 MV,
kontraŭpremaj multŝtupaj turbinoj kun regulata vaporprenado 25 MV,

kontraŭpremaj multŝtupaj turbinoj sen regulataj vapor-prenadoj, kontraŭpremaj unuŝtupaj turbinoj kun labordono ĝis 2.500 KV por enira vaporo por movigo de genaratoroj, turbin-trinkigiloj, turbin-kompresoroj, pumpiloj kaj simile,
specialaj vaporturbinoj por du rapor-eniroj,
plenigaj balgbloviloj por naft-motoroj.

Unua Brna Maŝinfabriko, Brno, Olomoucká 7-9,
PRVNÍ BRNĚNKÁ STROJÍRNA, závody Klementa Gottwalda, n. p, Brno, Olomoucká.

Esperanto-klubo en Brno kunvenas ĉiumarde vaspere en la hotelo Slovan, Lidická strato 23
Esperanto-rondeto ĉe uzina klubo ROH-l.B.ZKG kunvenas ĉiumerkrede je la 19 h. en la klubejo Olomoucká strato 11.
Esperanto-servo per telefono: 72811 /316 -Balaš. A.
50844 -Adamcová M.
53603 -Konečná J.

STRUČNÁ HISTORIE BRNA.
U příležitosti 3. strojírenské výstavy v Brně vydal:
Esperantský kroužek závodního klubu ROH-l.B.ZKG.p. Brno. Sestavil a překlad pořídil: Arnošt Balaš.
Rozmnožil: Propagační oddělení 1.B.ZKG n.p. Brno, Olomoucká 7.
Vydáno nákladem 500 kusů
Povoleno k tisku 5.VII.1957 -MNV-BOK 1324, HSTD -Q260-757